
**Budapeŝto sur la bordo de  
Danubo.**

Az Országház Budapest egyik legimpozánsabb épülete a Duna partján.

**Ĝi estas la rezidejo de la  
parlamento.**

Ez az országgyűlés székhelye.

**Tie kunsidas kaj laboras la  
gvidantoj de nia lando.**

Itt üléseznek és dolgoznak az ország vezetői.

**Meze ĝi havas grandegan kupolon,  
kaj ĉiuflanke multajn turojn.**

Középen van egy nagy kupolája, és minden oldalán sok tornya.

**Ĝi troviĝas inter la pontoj  
Margareta kaj Ĉenponto.**

A Margit- és a Lánchíd között található.

**Vid-al-vide, sur la transa bordo  
altiĝas la Fortikaĵmonto kun la  
preĝejo Matiaso kaj la Fiŝista  
bastiono.**

Szemben, a túloldalon emelkedik a Várhegy, amin a Mátyás templom és a Halászbástya található.

**Super la Parlamentejo la ĉielo  
estas blua.**

Az Országház fölött kék az ég.

**Ankaŭ la rivero Danubo havas  
bluan koloron.**

A Dunának is kék a színe.

**Sur ĝi trafikaj ŝipoj, bargoj kaj  
boatoj.**

Azon hajók, uszályok és csónakok közlekednek.

**Ĉiujare la 20-an de aŭgusto oni  
aranĝas festan paradon antaŭ la  
Parlamentejo sur la rivero  
Danubo.**

Minden évben augusztus 20-án ünnepi felvonulást rendeznek az Országház előtt a Dunán.

**Samtempe oni amuzas la homojn  
per piroteknikaĵoj.**

Ugyanakkor tűzijátékkal szórakoztatják az embereket.

**Vespere la Parlamentejo estas  
prilumita per festa lumo.**

Este az Országház ünnepi fénnel van megvilágítva.

\*\*\*\*\*

### **P) Szőlőszüret**

*Szüretelnek a hegyen*

**Sur la bildo kelkaj homoj laboras  
sur la monto.**

A képen néhány ember dolgozik a hegyen.

**Ili iras inter la vicoj de vinberujoj.**

A szőlősorok között mennek.

**La vinberujoj havas ankoraŭ  
multajn, verdajn foliojn.**

A szőlőtökéken még sok zöld levél van.

**Sur la bildo jam estas aŭtuno.**

A képen már ős van.

**En la fono de la bildo estas bela  
panoramo kun arbetoj, montetoj  
kaj vilaĝo.**

A kép háttérében szép a kilátás, kis fák, dombok és egy falu látható.

**Certe estas varma tago, ĉar la  
homoj surhavas nur malmulte da  
vestoj.**

Biztosan meleg nap van, mert az embereken csak kevés ruha van.

**En la vinbergardenoj fine de la  
somero maturiĝas vinberoj.**

A szőlőskertekben nyár végén érik a szőlő.

### **R) Képtár**

*Egy terem sok képpel; egy nő áll az  
ajtó mellett tarka ruhában*

**Sur la bildo mi vidas ĉambron kun  
du fenestroj.**

A képen egy szobát látok, amelynek két ablaka van.

**En la ĉambro pendas multaj  
pentraĵoj sur la blankaj muroj.**

Sok kép függ a szobában a fehér falakon.

**Laŭ mia opinio ĝi estas ĉambrego  
de muzeo.**

Véleményem szerint ez egy múzeumi terem.

**Mi pensas, ke ĝi estas ekspozicio.**

Azt gondolom, hogy ez egy kiállítás.

**La pentraĵoj plaĉas al mi.**

A festmények tetszenek nekem.

**Apud la pordo staras virino.**

Az ajtó mellett egy nő áll.

**Ŝi estas mezaĝa, ŝi havas buntan  
vestaĵon.**

Középkorú, tarka ruhát visel.

**Elektraj lampoj prilumas la  
pentraĵojn.**

Villanylámpák világítják meg a festményeket.

\*\*\*\*\*

### **S) Könyvtár**

*A helyiség és könyvek kölcsönzése*

**Meze de la bildo, en la fono staras  
librobretaro.**

A kép közepén, a háttérben könyvespolcok állnak.

**Sur tiuj estas multaj, diversaj  
libroj.**

Azokon sok, különféle könyv van.

**Gestudentoj povas prunti librojn ĉi tie.**

A diákok itt könyveket kölcsönözhetnek.

**Meze de la bildo sidas la bibliotekistino, kiu interparoladas kun studento.**

A kép közepén a könyvtárosnő ül, aki egy diákkal beszélget.

\*\*\*\*\*

### **T) Zenélő család**

*Egy család tagjai különböző hangszereken együttesben játszanak*

**Sur la bildo mi vidas familion. Ili sidas en ĉambro sur seĝoj kaj muzikas.**

A képen egy családot látok. A székeken ülnek egy szobában és zenélnek.

**Ili muzikas per diversaj muzikiloj. Különféle hangszereken játszanak. Ili violonludas, trumpetas, kaj iu ludas sur fortepiano.**

Hegedülnek, trombitálnak, és egyikük zongorázik.

**Verŝajne ili deziras roli ie.**

Valószínűleg valahol szeretnének fellépni.

\*\*\*\*\*

### **U) Mikulás**

*A Mikulás és a vele kapcsolatos ünnep*

**Sur la bildo estas videbla maljuna homo.**

A képen egy öregember látható.

**Li estas la Sankta Nikolao.**

Ő a Mikulás.

**Li portas ruĝan vestaĵon kaj ruĝan ĉapelon.**

Piros ruhát, és piros sapkát visel.

**Li havas longan, blankan barbon.**

Hosszú, fehér szakála van.

**Li portas sakon sur sia ŝultro.**

Egy zsákot visz a hátán.

**En ĝi estas ludiloj, ĉokoladoj kaj ĉiusecaj donacoj.**

Játékok, csokoládé és mindenféle ajándék van benne.

**La sesan de decembro estas la festotago de la Sankta Nikolao.**

December 6-án van a Mikulás ünnepe.

**Tiam la infanoj metas siajn ŝuojn en la fenestron, kaj la Sankta Nikolao metas la donacojn en ilin, kiujn ili petis de li.**

Akkor a gyerekek kiteszik a cipőjüket az ablakba, és a Mikulás beleteszi azokat az ajándékokat, amiket kértek tőle.

\*\*\*\*\*

### **V) Karácsonyfa**

*Karácsonyról és az ajándékozásról*

**Sur la bildo estas videbla belega arbo.**

A képen egy gyönyörű fa látható.

**Ĝi estas kristnaska arbo.**

Ez egy karácsonyfa.

**Antaŭ nelonge ĉi tiu arbo ankoraŭ kreskis en la arbaro.**

Nemrégén ez a fa még az erdőben állt.

**Nun ĝi staras ĉi tie tute ornamita.**

Mos itt áll teljesen feldíszítve.



**Sur ĝi pendas multaj  
ornamobjektoj, kandeloj,  
lampetoj.**

Sok dísz, gyertya, lámpácska függ  
rajta.

**Sub la kristnaska arbo estas  
donacaĵoj.**

A karácsonyfa alatt ajándékok van-  
nak.

**La 24-an de decembro estas la  
festotago de Kristnasko.**

December 24-én van Karácsony ün-  
nepe.

**Ĝi estas la plej granda familia  
festo de la jaro.**

Ez az év legnagyobb családi  
ünnepé.

**La Kristnasko estas la simbolo de  
la amo.**

A Karácsony a szeretet szimbóluma.

\*\*\*\*\*

## **Z) Tengerpart**

*A tengerparton napoznak, szórakoz-  
nak, háttérben üdülők, szállodák*

**Kelkfoje mi vizitis la maron en  
Kroatio.**

Néhányszor már jártam Horvát-  
országban a tengernél.

**Laŭ mia opinio oni fotis tiun  
bildon en Kroatio.**

Véleményem szerint az a kép Hor-  
vátországban készült.

**La vetero estas belega.**

Az idő gyönyörű.

**La suno brilas varmege, sur la  
ĉielo ne estas nuboj.**

A Nap forrón süt, az égen nincsenek  
felhők.

**Sur la marbordo estas turistoj,  
kiuj ludas: pilkludas, futbalas,  
kuras, interparoladas, manĝas  
glaciaĵojn, trinkas malvarman  
kolaon.**

A tengerparton turisták vannak, akik  
játszanak: futballoznak, futnak, be-  
szélgetnek, fagyaltot esznek, hideg  
kólát isznak.

**En la akvo la turistoj velboatas,  
baniĝas, naĝas kaj pilkludas.**

A vízben a turisták vitorláznak, fű-  
rödnek, úsznak és labdáznek.

**En la fono estas kelkaj ripozdomoj  
kaj hoteloj, kie la turistoj loĝas.**

A háttérben van néhány üdülő és  
szálloda, ahol a turisták laknak.

\*\*\*\*\*

A vizsga  
harmadik része

\*\*\*\*\*

*Szituációs gyakorlat*

\*\*\*\*\*



## 1. Sítanfolyam, biztosítás

**Ausztriába menne sítanfolyamra. Kérdezze meg, mennyibe kerül, a tanfolyamdíjban benne van-e a biztosítás. Ha közben baleset érné, hogyan jutna haza?**

I: Bonan tagon, sinjoro!

Jó napot, uram!

*E: Bonan tagon! Mi volus peti informojn pri la aŭstriaĵ skikursoj. Jó napot! Szeretnék felvilágosítást kérni az osztrák sítanfolyamokról.*

I: Diru ion pli precizan, pri kio vi pensas!

Mondjon valami közelebbit, mire gondolt!

*E: Kiam komenciĝos via skikurso? Mikor kezdődik az önök sítanfolyama?*

I: Ĝi komenciĝos en septembro. Szeptemberben kezdődik

*E: Kiom ĝi koston?*

*Mennyibe kerül?*

I: Ĝi koston 300 eŭrojn. 300 euróba kerül.

*E: Ĉu la asekuro estas en la prezo? A biztosítás benne van az árban?*

I: Jes, kompreneble.

Igen, természetesen.

*E: Se mi malsaniĝus, kiel oni veturigus min hejmen?*

*Ha megbetegednék, hogyan hoznának haza?*

I: La asekurpago enhavas vian transporton pro akcidento. Oni veturigus vin per aŭtobuso aŭ helikoptero.

A biztosítási díj magában foglalja baleset esetén az ön hazaszállítását.

Autóbusszal vagy helikopterrel hoznák haza.

*E: Kiam mi devas pagi?*

*Mikor kell fizetnem?*

I: Post du tagoj.

Két nap múlva.

*E: Dankon. Mi revenos postmorgaŭ.*

*Köszönöm. Holnapután visszajövök.*

I: Ne dankinde.

Szívesen.

*E: Ĝis revido!*

*Viszontlátásra!*

## 2. Kiküldetés külföldön

**Ön kiküldetésben van külföldön. Partnervállalata portásánál (a vizsgáztatónál) érdeklődjön, hol találja meg Kowalska kisasszonyt, akivel tárgyalni szeretne. Mutatkozzon be, és mondja, hogy tíz órára beszélték meg a találkozót.**

E: – Bonan tagon!

I: – Bonan tagon! Ĉu mi povus helpi al vi?

E: – Jes. Mi nomiĝas sinjoro Paŭlo Lévai. Mi estas hungaro. Mi venis el Budapeŝto. Mi dezirus interparoli kun sinjorino Kowalska. Bedaŭrinde mi ne konas ŝin persone.

I: – Antaŭ kelkaj minutoj mi vidis ŝin en la koridoro. Atendu momenton! Mi ekscios pertelefone, ĉu ŝi jam estas en sia laborĉambro... Jes, ŝi akceptos vin je la deka horo.

E: – Bonvolu akompani min al ŝia ĉambro!

I: – Volonte mi akompanus vin, sed tio ne estas necesa. Ŝia ĉambro estas fine de la koridoro.

E: – Bone, mi trovos ĝin. Koran dankon por via helpo.

### 3. Vendégfogadás

**Külföldi ismerőse (a vizsgáztató) érkezik Budapestre. Üdvözlje őt, kérdezze meg, hogyan utazott. Mondja meg, hogy az Astoriában foglalt számára egy egyágyas szobát. Kérje el a bőröndjét, és ajánlja fel, hogy a saját kocsiján elviszi a szállodába, és segít bejelentkezni.**

– Saluton! Bonvenon! Mi tre ĝojas vidi vin.

– *Reciproke.*

– Ĉu vi vojaĝis komforte?

– *Relative jes. Mi dankas, ke vi venis akcepti min.*

– Kompreneble. Ne dankinde. Mi rezervis por vi unulitan ĉambron kun banĉambro en la hotelo „Astoria”. Mi esperas, ke vi estos kontenta.

– *Nepre. Dankon.*

– Bonvolu doni al mi vian valizon. Mi volus helpi al vi. Krome mi veturigos vin al la hotelo per mia aŭtomobilo. Tie mi povos helpi al vi registriĝi.

– *Dankon. Vi estas tre afabla. Ni ekiru!*

### 4. Bűnügy

**Ellopták a pénztárcáját. Forduljon a rendőrséghez (a vizsgáztatóhoz). Mesélje el az esetet részletesen!**

E: – Mi deziras denunci nekonatan krimulon. Mi deziras anonci, ke perdiĝis mia monujo. En ĝi estis mia

tuta kontanta mono, ĉirkaŭ 80 mil forintoj. Ŝajnas al mi, ke iu forŝtelis ĝin en magazeno, hodiaŭ antaŭtagmeze, inter la deka kaj dekunua horoj. Jen la atestilo de la banko pri la vendo de valuto. Mi volis pagi ĉe la kaso, sed mia monujo jam mankis. Mi hejmeniris, traserĉis ĉion, sed mi ne trovis ĝin. Cetere mi memoras, ke forironte mi metis ĝin en mian internan poŝon.

I: – Pri kiu vi suspektas?

E: – Mi loĝas proksime al la magazeno, do mi iris tien piede. Proksimiĝante al la magazeno, frapis miajn okulojn, ke viro kun griza hararo sekvas min. Ankaŭ li envenis, kaj ĉiam restadis malantaŭ mi. Ankaŭ ĉe la vendotablo li staris rekte malantaŭ mi. Povas esti, ke li eltiris mian monujon el mia poŝo, kaj mi ne rimarkis tion. Sed povas esti, ke mi eraras...

I: – Kiel aspektis la ŝtelisto?

E: – Li surhavis nigran T-ĉemizon, malpuran nigran pantalonon kaj sandalojn. Ĉu ili estis brunaj? Mi ne povas rememori. Li estis brunulo, ĉirkaŭ 170 centimetrojn alta kaj dika.

I: – Bonvolu trankviliĝi, ni ekzamenos la aferon.

### 5. Nyelvtanulás

**Eszperantó nyelvtanfolyam iránt érdeklődik. Kérdezzen meg ezzel kapcsolatban minden részletet: mikor kezdődik, hol lesz, hány fős a csoport, mennyibe kerül stb.**



– Kiam komenciĝos la sekva Esperanto-lingvokurso por komencantoj, kaj kiom longe ĝi daŭros?

Mikor komenciĝas la sekvanta komencantoj lingvokurso, kaj med-  
dig tart?

– Ĝi komenciĝos la 6-an de januaro, je la 17-a horo, en tiu ĉi ejo. La kurso daŭros 40 horojn. Ĝi okazos dufoje en ĉiu semajno dum tri horoj. Január 6-án, 17 órákor kezdődik, éppen a helyiségben. A tanfolyam 40 órás. Heti két alkalommal 3-3 óra.

– Kiom da personoj kutimas partopreni en la kursoj?

Hány fős szokott lenni egy tanfolyam?

– Maksimume po 10-15 personoj. Legfeljebb 10-15 fős.

– Kiagradajn lingvokursojn vi organizas?

Milyen szintű nyelvтанfolyamokat szerveznek?

– Ni organizas lingvokursojn por komencantoj kaj por progresantoj. Ni preparas la kursanojn por bazgrada, mezgrada kaj supergrada ŝtataj lingvoekzamenoj.

Kezdő és haladó nyelvтанfolyamokat szervezünk. A hallgatókat alapfokú, középfokú és felsőfokú állami nyelv-  
vizsgára készítjük fel.

– Mi volus aliĝi al la sekva bazgrada lingvokurso. Ĉu mi devas plenigi ian demandilon aŭ formularon?

Szeretnék jelentkezni a következő kezdő nyelvтанfolyamra. Ki kell töl-  
tenem valamilyen kérdőívet, vagy űrlapot?

– Ne. Mi notos nur viajn nomon, adreson kaj telefonnumeron. Ni

informos vin telefone, se okazus ia ŝanĝo.

Nem. Csak a nevét, címét és a telefonszámát írom fel. Telefonon tájé-  
koztatjuk, ha valami változás történ-  
ne.

– Kiam mi devas pagi? Ĉu eblas pagi en partoj?

Mikor kell fizetnem? Lehet részle-  
tekben fizetni?

– Jes. Dum la daŭro de la kurso vi povas pagi ties kotizon. A tanfolyam alatt kifizetheti a részvételi díjat.

## 6. Betört az üveg

**Betört az ablaküveg, hívjon telefo-  
non üvegest (méretek, fizetés kész-  
pénzben vagy átutalással, sürgős).**

– Halo! Mi estas sinjoro Viktor Bródi. Ĉu vi estas vitristo?

Halló! Bródi Viktor vagyok.

– Jes. Mi estas tiu.

Igen, én az vagyok.

– Mi havas problemon. Hazarde mi rompis la fenestrovitron. Bonvolu helpi! La fenestro fermiĝis pro la vento, kaj la vitro rompiĝis.

Van egy gondom. Véletlenül betör-  
tem az ablaküveget. Kérem, segít-  
sen! Az ablak becsukódott a szél mi-  
att, és betört az üveg.

– Bonvolu diri ties mezurojn!

Mondja meg a méretét!

– Ĝi estas du metrojn alta, kaj unu metron larĝa. Kiam ĝi estos preta? Két méter magas, és egy méter szé-  
les. Mikor lesz kész?

– Tuj mi iros tien kaj riparos ĝin.

Azonnal odamegyek, és megjavítom.

– Mi restos hejme kaj atendos vin. Itthon maradok, és várni fogom.

– *Ĉu vi pagos per kontanta mono aŭ pere de banko?*

*Keszpénzzel, vagy bankon keresztül fizet?*

– Mi pagos per kontanta mono.

Keszpénzzel fogok fizetni.

– *Dankon.*

*Köszönöm.*

– Ne dankinde.

Szívesen.

– *Ĝis la revido!*

*Viszontlátásra!*

### **7. Lakásszentelő (Inaŭguro de la loĝejo)**

**Barátja új lakást vásárolt. Öntől kér tanácsot, kiket hívjon meg a lakásszentelőre.**

I: Saluton, kara mia amiko!

E: Saluton!

I: Eble vi scias, ke antaŭ kelkaj semajnoj mi aĉetis novan triĉambran loĝejon. Sabate mi dezirus festi, aranĝi inaŭguron de nia loĝejo. Mi invitas vin.

E: Koran dankon. Kiam ni renkontiĝos?

I: Ni renkontiĝu la duan de aŭgusto je la sepa vespere.

Ĉu vi povus proponi al mi, kiujn mi invitu al tiu festo. Vi konas miajn amikojn bone.

E: Mi proponas inviti la direktoron de la bazlernejo, sinjoron Gál.

Kompreneble invitu ankaŭ liajn familianojn, entute kvin personojn! Ne forgesu, ke nia komuna amiko, Viktoro tre ŝatas amuziĝi. Invitu ankaŭ lin! Eble li venos kun sia familio. La gastoj

alportos diversajn donacojn, drinkaĵojn (ĉampanon, vinon, konjakon), eĉ tapiŝojn por viaj muroj.

I: Kion ni manĝu?

E: Vi scias, ke mi tre ŝatas kuiri, friti, baki, rosti. Se vi aĉetos necesajn aĵojn (varojn), mi kuiras buljonon kaj farĉitajn brasikojn. Mi havas kelkajn bonajn kompaktn diskajn. Nepre mi kunportos ilin, kaj ni povos aŭskulti bonan muzikon.

I: Dankon por via helpo.

E: Ne dankinde.

### **8. Találkozás (Renkontiĝo)**

**Barátja (a vizsgáztató) tanácsot kér Öntől.**

I: Saluton, Petro!

E: Saluton, mia kara amiko! Ni renkontiĝis antaŭlonge.

I: Jes. Se nun vi havas liberan tempon, mi invitas vin por trinki kafon aŭ teon.

E: Bone. Dankon.

I: Ĉu vi trinkos la kafon kun sukero kaj kremdensaĵo?

E: Jes

I: Eble vi povus doni al mi necesajn konsilojn. Vi scias, ke mi tre ŝatas ekskursi. Du miaj kolegoj invitis min por ekskursi. Unu el ili invitis min ekskursi per biciklo, la dua per aŭto.

E: Laŭ mia opinio promenadi kaj bicikladi sub la ĉielo estas eksterordinara sento. Ankaŭ mi ŝatas bicikladi en arbaro. Tio estas sana, resaniga, agrabla. Via organismo refreŝiĝas, vi povas ĝui la freŝan

aeron. Se vi laciĝas, vi povas halti, ripozi, kuŝiĝi sur la herbejon, sunumi iomete. Dum biciklado sur arbajaj vojetoj vi povas interparoladi kun viaj amikoj pri diversaj temoj.

I: Dankon por viaj proponoj.

E: Ne dankinde.

I: Ĝis revido!

E: Ĝis revido!

### 9. Utazás külföldre (Vojaĝo al eksterlando)

**Tervezze el barátjával közös külföldi útjukat.**

E: Mi tre ĝojas, ke ni renkontiĝis. Mi esperas, ke vi ne forgesis nian vojaĝon al Grekio.

I: Ne, mi memoras ĝuste. Ni ekiros la duan de aŭgusto.

E: Ankoraŭ ni ne decidis, per kiu veturilo ni vojaĝos. Mi proponas vojaĝi per aŭtobuso. Vojaĝo per aŭtobuso estas relative malmultekosta. Kiam oni veturas kune, oni ne enuiĝas. Ekzistas tiuj aŭtobusoj, kiuj estas klimatizitaj kaj havas televidilon, videoaparaton. La pasaĝeroj povas rigardi filmojn dum la vojaĝo. La tempo pasas tre rapide kaj agrable.

I: Vi pravas, tamen mi proponas al vi, ke ni vojaĝu per mia aŭtomobilo Aŭdi.

E: Mi scias, ke vi aĉetis novan aŭton (mi gratulas vin!), sed vi ricevis vian stir-raĵtigilon (kondukrajtigilon, ŝoforpermeson)) nur antaŭ kelkaj semajnoj. Vi ne havas praktikon. Mi stiras jam dek jarojn kaj mi karambolis neniam. Ĉu vi permesus

al mi stiri vian aŭtomobilon dum tiu longa vojaĝo? Dume vi devus ripozi...

I: Tio estas bona ideo. Do ni interkonsentis. Ĝis revido!

E: Ĝis revido!

### 10. Éjszakai rendzavarás (Nokta ĝeno)

**Nem tud aludni, mert a szomszéd lakásban nagy a zaj, hangos a zene. Kifogásolja ezt szomszédjánál.**

E: Bonan vesperon!

I: Bonan vesperon!

E: Ĉu vi parolas Esperante?

I: Jes.

E: Tiam mi esperas, ke ni komprenos unu la alian. Kion vi faras nun?

I: Ni festas nian naskiĝtagon.

E: Mi gratulas vin...

I: Dankon.

E: ... sed mi ne povas dormi, ĉar via muziko estas tre laŭta. Vi dancas, kantas, kriadas.

I: Mi petas pardonon. Bonvolu enveni, kaj trinki glason da konjako! Je mia sano!

E: Dankon. Ne. Laŭ mia opinio vi devas mallaŭtiĝi, ĉar laŭ nia domordo post la deka horo oni ne povas ĝeni unu la alian. Rigardu! Estas jam la dekunua kaj tri kvaronoj.

I: Mi tre bedaŭras, ke ni ĝenas vin. Post dek minutoj ni disiros.

E: Dankon! Bonan nokton!

### 11. Síkirándulás (Skiekskurso)

**Tájékoztassa barátját egy közös  
osztrák sítúra előkészületeiről.**

E: Halo! Ĉi tie parolas via amiko,  
Petro.

I: Saluton, Petro! Kia novaĵo estas?

E: Mi volus informi vin detale pri  
nia komuna ekskurso al Aŭstrio. La  
kristnaskaj ferioj komenciĝos la 22-  
an de decembro. Ni vojaĝos marde,  
la 27-an de decembro, kaj ni restos  
tie ĝis la 5-a de januaro. Ne forgesu!  
Vestiĝu varme! Vi ne devos kunporti  
viajn skiojn kaj skibotojn, ĉar tie ni  
povos pruntepreni ilin  
malmultekoste. Ŝanĝu kvindek mil  
forintojn je eŭroj. Ni vojaĝos per mia  
aŭtomobilo.

I: Vi diris, ke ni ekiros la 27-an de  
decembro. Je kioma horo?

E: Ni renkontiĝu je la sesa matene  
antaŭ via domo!

I: Bone.

E: Ĝis revido!

### 12. Bébiszitter (Bebogardistino)

**Kölföldi szomszédja megkéri, vi-  
gyázzon a fiára. Beszéljék meg a  
részleteket.**

I: Saluton! Ĉu vi estas Enikő? Mia  
nomo estas Hans Günter. Mi estas  
via nova najbaro.

E: Jes, mi konas vin. Ni renkontiĝis  
kelkfoje en la koridoro.

I: Kara Enikő! Mi havas al vi  
grandan peton. Sabate niaj  
familianoj veturos al Berlino por tri

tagoj. Nia filo restos hejme. Ĉu vi  
povus gardi lin?

E: Volonte. Mi tre ŝatas infanojn.

Kiom da jaroj li havas?

I: Petro estas kvin jara.

E: Ĉu mi devos kuiri por li? Kion li  
manĝas ĝenerale?

I: Vi ne devos kuiri. Liaj manĝaĵoj  
estas en nia fridujo. Cetere li kutimas  
manĝi ĉiujn manĝaĵojn.

E: Se li ŝatas rigardi  
televidprogramojn, videofilmojn, ni  
povus resti hejme. Ĉu li kutimas  
promenadi, rigardi zooparkon? Ni  
povus viziti zooparkon, ĉirkaŭ kaj  
pupteatron.

I: Tio estas bona ideo. Koran dankon  
por via helpo.

E: Ĝis revido!

### 13. Mi történt az ön fiával? (Kio okazis al via filo?)

**Barátja (a vizsgáztató) tanácsot  
kér egy családi problémájával  
kapcsolatban.**

I: Saluton, kara mia amiko! Mi havas  
grandan problemon.

E: Ĉu mi povus helpi al vi?

I: Jes, dozu al mi konsilon! Vi scias,  
ke mi havas filon. Li estas dek jara.  
Pasinttempe li estas malatentema,  
maldiligenta, laca, kaj li havas  
kapdoloron senĉese. Mi ne scias, kio  
okazis al li.

E: Ĉu li ŝatas legi, rigardi  
televidprogramojn, videofilmojn?

I: Ne, tute ne.

E: Ĉu vi ne pensas, ke li vidas  
malbone?

I: Povas esti.

E: Laŭ mia opinio okulkuracisto devus ekzameni lin. Eblas, ke li vidas malbone, liaj okuloj estas malfortaj. Ankaŭ mi portas okulvitrojn. Mi havas bonan okulkuraciston. Mi donos al vi lian telefonnumeron. Surskribu: du, tri, kvar, kvar, tri, du. Lia nomo estas János Szócs.

I: Koran dankon por via helpo.

E: Ne dankinde.

#### 14. Rosszul alszom (Mi dormas malbone)

**Panaszkodjon, hogy sokat dolgozik, keveset pihen, rosszul alszik. Kérjen életvezetési tanácsokat.**

I: Saluton! Vi ŝajnas pala. Kiel vi fartas? Laŭ mia opinio vi estas malsana...

E: Bedaŭrinde pasinttempe mi laboris tre multe. Mi devis viziti familiojn, ĉar mi estas instruisto. Mi havas multajn studhorojn semajne. Ankaŭ nuntempe mi havas kapdoloron. Ofte mi havas kapturniĝon, mi estas malforta, laca. Mi ne povas dormi nokte. Mi dormas nur kelkajn horojn. Aŭrore mi vekiga.

I: Laŭ mia opinio vi devas libertempi kaj ripozi. Ĉu vi libertempis somere? Pedagogoj havis feriojn.

E: Bedaŭrinde mi ne povis ripozi, ĉar ni konstruis nian novan domon.

I: Vi devas dormi, promenadi, ekskursi kaj sporti. Sabate kaj dimanĉe. Mi tre ŝatas ekskursi. Venu kun mi dimanĉe al la montoj!

E: Tio estas bona ideo. Dankon.

Kiam kaj kie ni renkontiĝu?

I: Ni renkontiĝu je la sepa horo antaŭ mia domo.

#### 14. Disznóhús (Porkviando)

**Külföldön van, ahol nehezen lehet sertéshúshoz jutni. Mégis próbálja meg.**

I: Saluton! Kion vi volus aĉeti?

E: Saluton! Mi estas hungaro. Mi forveturos morgaŭ vespere. Mi volus gastigi miajn amikojn, ĉe kiuj mi loĝas. Mi dezirus fritti hungaran manĝaĵon, paprikan stufitan porkaĵon. Hungare oni diras „pörkölt”. Ĉu vi havas porkviandon?

I: Eble vi scias, ke en Germanio ĝenerale oni manĝas bovaĵojn. Mi ne vendas porkviandon.

E: Kie mi povus aĉeti porkviandon?

I: Laŭ mia opinio oni vendas porkviandon en la vendohalo, sed nuntempe ĝi estas fermita. Kuiru tiun hungaran manĝaĵon el bovoviando!

E: Tio ne povas esti! Necesas porkviando!

I: Mi rememoris, ke en malgranda vendejo eble oni vendas porkviandon. Iru laŭ la dekstra bordo de la rivereto al la urbocentro...!

E: Bone. Dankon.

I: Ĉu mi donu al vi mapon?

E: Ne. Dankon. Mi trovos tiun vendejon. Ĝis revido!



### 15. Nyári munka (Somera laboro)

**Külföldön tanul, nyári munkát keres. Érdeklődj meg a lehetőségeket.**

E: Saluton! Mia nomo estas Eva Bakó. Mi estas hungarino. Mi studas en la Madrida Universitato. Mi legis, ke vi serĉas laborantojn. Nun mi havas ferion.

I: Mi proponas al vi disporti ĵurnalojn aŭ kolekti pomojn.

E: Kiom da eŭroj vi povos doni al mi por tiu laboro?

I: Se vi elektos pomkolektadon, po dek kilogramoj vi povos ricevi tri eŭrojn.

E: Ĉu mi povus tagmanĝi en la pomĝardeno?

I: Tie oni ne kuiras. Vi devos kunporti manĝaĵojn. Kiom da tempo vi dezirus labori?

E: Mi volus labori julie kaj aŭguste. Mi kolektis jam pomojn aŭtune en Hungario. Mi havas praktikon.

I: Bone. Ni interkonsentis. Vi devas komenci vian laboron morgaŭ matene je la sesa horo. Ĝis revido!

E: Dankon. Ĝis revido!

### 16. Újságokról (Pri gazetoj kaj ĵurnaloj)

**Ön Londonból érkezett Magyarországra. Néhány éve itt dolgozik. Barátja (a vizsgáztató) olvasási szokásai iránt érdeklődik.**

I: Vi laboras en Hungario jam du jarojn. Vi parolas bone hungare.

E: Dankon por via komplemento.

I: Tio ne estas komplemento. Tio estas fakto.

E: Regule mi legas hungarajn gazetojn kaj ĵurnalojn.

I: Kiujn ĵurnalojn vi ŝatas legi?

E: Mi kutimas legi vespere kaj semajnfine, kiam mi havas liberan tempon. Miaj ŝatataj (preferataj, favorataj) ĵurnaloj estas Magyar Nemzet, Népszabadság, Népszava.

I: Ĉu vi legas anglalingvajn gazetojn?

E: Kompreneble, ĉar la angla lingvo estas mia gepatra lingvo.

I: Pri kiuj temoj vi kutimas legi artikolojn?

E: Miaj ŝatataj temoj estas literaturo, artoj, muziko, sed mi interesiĝas pri politiko, sporto.

I: Bedaŭrinde mi havas malmulte da libera tempo. Mi devas rapidiĝi. Ĝis revido!

E: Ĝis revido!

### 17. Rossz kirándulás (Malbona ekskurso)

**Reklamáljon, mert a szervezett osztrák sítúrája nagyon rosszul sikerült (a szobában gyenge volt a fűtés, ebéd helyett vacsorát kaptak stb.). Kérje vissza a részvételi díj felét.**

E: Kara sinjoro! Mi estas malkontenta pri la skiekskurso al Aŭstrio.

I: Kiam vi veturis?

E: Mi veturis la 22-an de januaro. Por la tuta ekskurso mi pagis 110 eŭrojn. Mi havis problemojn dum nia tuta ekskurso. Ekzemple: en nia hotelo oni hejtis malforte; anstataŭ

tagmanĝo oni servis al ni  
vespermanĝon; nia aŭtobuso  
malfunkciis dum la vojaĝo kelkfoje,  
ni devis atendadi po 2-3 horojn sub  
la ĉielo, kaj ni malvarmumis.

I: Mi tre bedaŭras, sinjoro, ke vi ha-  
vis problemojn.

E: Mi petas vin, bonvolu repagi al  
mi almenaŭ kvindek procentojn de la  
pagita sumo (prezo).

I: Bedaŭrinde mi ne povas fari tion.  
Mi havas alian opinion kaj  
proponon. Se vi partoprenos en nia  
sekvonta skiekskurso, mi donos al vi  
kvindek procentojn da rabato.

E: Mi devas pripensi la aferon. Mi  
revenos post du tagoj. Ĝis revido!

I: Bone. Ĝis revido!

### **18. Karorája elromlott (Via brakhorloĝo estas difektita)**

**Elromlott a karorája. Folytasson  
erről párbeszédet az órással.**

– Mia brakhorloĝo difektiĝis. Mi ne  
scias, kio okazis al ĝi. Bonvolu kont-  
roli ĝin!

Elromlott az óráam. Nem tudom, mi  
történt vele. Legyen szíves megnéz-  
ni!

– *Mi tuj kontrolos ĝin.*

*Azonnal leellenőrzöm.*

– Kiam ĝi estos preta?

Mikor lesz kész?

– *Post du tagoj.*

*Két nap múlva.*

– Kiom da forintoj kostos ĝia riparo?  
Mennyibe kerül a javítás?

– *Mi ne povas diri precize. Ĝi kostos  
ĉirkaŭ kvincent forintojn.*

*Nem tudom pontosan megmondani.*

*Körülbelül 500 forint lesz.*

– Bone, dankon. Post du tagoj mi  
revenos por ĝi.

Jó, köszönöm. Két nap múlva jövök  
érte.

### **19. Vásárlás (Aĉetado)**

**Külföldön van a tengerparton, és  
egy illatszerboltban kell naptejet  
vásárolnia. Érdeklődjön arról is,  
hogy meddig tart még a kánikula!**

– Bonan tagon, sinjoro!

Jó napot, uram!

– *Saluton, kara sinjorino! Kion vi  
deziras (aĉeti)?*

*Üdvözlöm, kedves hölgyem, mit  
őhajt (venni)?*

– Mi deziras aĉeti sun(um)oleon por  
mi. Kion vi proponas?

Napolajat szeretnék venni. Mit  
ajánl?

– *Kompreneble ni havas diversajn  
sun(um)oleojn.*

*Természetesen többféle napolajunk  
van.*

– Mi volas aĉeti tiun, kiu defendas  
min efike kontraŭ la sunbrilo.

Olyat szeretnék venni, amely haté-  
konyan véd a napsugárzástól.

– *Jen estas ĝuste tia.*

*Íme, ez éppen olyan.*

– Bone. Ĝi plaĉas al mi. Mi aĉetos  
ĝin. Kiom ĝi kostas?

Jól van. Ez tetszik nekem. Megve-  
szem. Mennyibe kerül?

– *Ĝi kostas dek eŭrojn.*

*Tíz euróba kerül.*

– Nun mi deziras pagi. Jen estas la  
mono. Mi volus demandi eĉ tion, laŭ  
vi kiom longe daŭros ankoraŭ la  
varmego, laŭ vi?

Most fizetni szeretnék. Tessék a pénz. Azt szeretném még megkérdezni, ön szerint meddig tart a kánikula.

– *Laŭ la meteorologia prognozo ĝi daŭros ankoraŭ minimume dum semajno.*

*Az időjárás-előrejelzés szerint legalább egy hétig tart még.*

– Dankon.

Köszönöm.

– *Ne dankinde.*

*Szívesen.*

– *Ĝis la revido!*

Viszontlátásra!

## 20. Repülőjegy vásárlás (Aĉeto de flugbileto)

**Azonnal szeretne Párizsba utazni.  
Vásároljon jegyet a repülőtéren.**

– Mi volus veturi al Parizo.

Párizsba szeretnék utazni.

– *Ĉu ankoraŭ hodiaŭ?*

*Még ma?*

– Jes, se mi sukcesos aĉeti bileton.

Je kioma horo forflugos la sekva avidilo plej frue?

Igen, ha sikerül jegyet vennem.

Hány órakor indul leghamarabb a következő gép?

– *Ankoraŭ ni havas kelkajn biletojn.*

*La flugmaŝino de MALĖV ekiros je la deksesa horo kaj tridek minutoj.*

*Még van néhány jegyünk. A Malév járata 16 óra 30 perckor indul.*

– Kiom kostas bileto por la dua klaso?

Mennyibe kerül egy másodosztályú jegy?

– *Ĝi kostas 39 mil forintojn.*

*Kompreneble temas pri ira-revena flugbileto.*

*39 ezer forintba kerül. Természetesen retúr repülőjegyről van szó.*

– Bonvolu doni unu bileton al mi!

Jen estas la mono.

Kérem adjon egy jegyet! Tessék a pénz.

## 21. Csere (Ŝanĝo)

**Egy nadrágot visszavisz a boltba,  
mert nem lett jó. Szeretné kicserélni.**

– Bonan tagon, sinjoro!

– *Saluton!*

– Mi reportis tiun pantalonon, kiun mi aĉetis hieraŭ, ĉar ĝi ne estas konvena por mia filo. Ĉu vi bonvolus ŝanĝi ĝin?

Visszahoztam a nadrágot, amit tegnap vettem, mert nem jó a fiamnak. Lenne szíves kicserélni?

– *Kial ne konvenis tiu pantalone?*

*Miért nem felelt meg a nadrág?*

– Mia filo diris, ke ĝia koloro ne plaĉas al li. Li ne ŝatas la brunan koloron, sed li ŝatas la nigran.

Krome, tiu pantalone iomete estas vasta.

A fiam azt mondta, hogy a színe nem tetszik neki. Nem szereti a barnát, a fekete színt szereti. Azonkívül egy kicsit széles.

– *Jen estas diversaj pantalonoj, bonvolu elekti la necesan.*

*Itt különböző nadrágok vannak, kérem, válassza ki a megfelelőt.*

– Koran dankon.

Nagyon köszönöm.

**22. Orvosnál**  
(*Ĉe la kuracisto*)

**Külföldön van, forduljon orvoshoz, mert láza van, és úgy véli, influenzás.**

- Mi havas problemon. Bonvulu helpi al mi!  
Van egy problémám. Legyen szíves segíteni!
- *Ĉu vere? Kio okazis al vi?*  
*Valóban? Mi történt önnel?*
- Mi estas eksterlandano, kaj mi malsaniĝis. Mi havas febron, kaj mia kapo doloras. Mi bezonas kuraciston. Povas esti, ke mi malvarmumis.  
Külföldi vagyok, és megbetegedtem. Lázam van, és fáj a fejem. Orvosra van szükségem. Lehet, hogy megfáztam.
- *Ĉu vi havas asekuron pri sanigo?*  
*Van egészségbiztosítása?*
- Jes, mi havas asekuron.  
Igen, van biztosításom.
- *Kie vi loĝas nun?*  
*Hol lakik most?*
- Mi loĝas en la Hotelo Astoria.  
Az Astoria Hotelben lakom.
- *Ĉu doloras vin via stomako?*  
*Fáj a gyomra?*
- Jes, iomete.  
Igen, egy kicsit.
- *Kion vi manĝis hodiaŭ kaj hieraŭ vespere?*  
*Mit evett ma és tegnap este?*
- Mi manĝis farĉitajn brasikojn.  
Töltött káposztát ettem.
- *Verŝajne vi manĝis tro multe. Iru hejmen, ripozu, kaj trinku multe da teo! Vi ne havas gripon.*

*Valószínűleg túl sokat evett. Menjen haza, pihenjen, és igyon sok teát! Ön nem influenzás.*

**23. Kórházban**  
(*En la hospitalo*)

**Eltört a lába, kórházban van, barátja meglátogatja, mesélje el neki, mi történt (hozott ételt és italt), a végén kérje meg, hogy dobja be a levelét (adja fel a csekkjét) a postán.**

- Saluton, mia kara amiko!  
Üdvözöllek, kedves barátom!
- *Estu salutata!*  
*Légy üdvözölve!*
- Sidiĝu sur la randon de mia lito!  
Ülj le az ágyam szélére!
- *Mi kunportis manĝaĵon kaj trinkaĵon al vi.*  
*Hoztam neked ételt és innivalót.*
- Koran dankon.  
Nagyon köszönöm.
- *Rakontu, kio okazis al vi?*  
*Meséld el, mi történt veled?*
- Mi ekskursis kun mia familio en la arbaro. Mi paŝis malbone, kaj mia dekstra maleolo rompiĝis.  
Kirándultam a családommal az erdőben. Rosszul léptem, és eltört a jobb bokám.
- *Mi deziras al vi rapidan resaniĝon.*  
*Nun mi devos iri hejmen...*  
*Gyors felépülést kívánok. Most haza kell mennem.*
- *Ĉu vi bonvolus alpoŝtigi mian leteron (enpagi mian ĉekon) en la poŝtoficejo?*  
Lennél szíves postára adni a leveleimet (befizetni a csekkemet) a postán?

– *Jes, kompreneble.*

*Igen, természetesen.*

– Dankon. Jen estas la letero (la ĉeko kaj la mono).

Köszönöm. Itt van a levél (a csekk és a pénz.)

### 23. En la aŭtoriparejo A szervizben

Nagyon siet haza Magyarországra, de elromlott a gépkocsija. Menjen be egy osztrák szervizbe, kérje meg a szerelőt, hogy minél előbb javítsa meg.

E: Saluton, sinjoro!

Üdvözlöm, uram.

I: Saluton. Ĉu vi havas problemon?

Üdvözlöm. Mivel szolgálhatok?

E: Bedaŭrinde mia aŭtomobilo funkcias malbone. Mi pensas, ke ĝia bremsosistemo ne estas en ordo.

Sajnos a kocsim nem működik jól.

Gondolom, hogy nincs rendben a fékrendszere.

I: Mi havas multe da laboro.

Bonvolu reveni morgaŭ vespere.

Sok a munkám, Kérem, jöjjön vissza holnap este.

E: Tio ne eblas, ĉar mi devos vojaĝi al Hungario hodiaŭ posttagmeze. La afero estas tre urĝa. Mia patrino malsaniĝis...

Ez lehetetlen, mert ma délután Magyarországra kell utaznom. A dolog nagyon sürgős. Édesanyám megbetegedett...

I: Mi konsentas kun vi. Nun mi kontrolos viajn bremsojn.

Együttérzek önnel. Most leellenőrzöm a fékeket.

E: Ĉu mi povus atendi ĉi tie?

Várhatnék itt?

I: Mi esperas, ke vi devos atendi nur kelkajn minutojn.

Remélem, hogy csak néhány percet kell várnia.

E: Koran dankon.

Nagyon köszönöm.



\*\*\*\*\*

A vizsga  
negyedik része

\*\*\*\*\*

*Hallott szöveg  
megértésének  
ellenőrzése,  
magnóhallgatás*

\*\*\*\*\*



## 1. Fervojista kongreso

Pasintan fojon mi menciis, ke pli detale mi informos niajn aŭskultantojn pri la internaciaj de la esperantistaj fervojistoj. Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis personan leteron de unu el la organizantoj de la kvardek tria kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kiu ĉi jare okazos en la najbara Ĉeĥio, en Olomouc. Sinjoro Pavel Polnický tiel skribas: „En la vicoj de la kongresanoj tute mankas viaj salamandanoj. Ĉu vi povus helpi?”

Nu jen, el du fontoj alvenis la invito kaj la informoj. Laŭ la informilo, antaŭkongresa feriado okazos en Prago, postkongreso en urbo Zilina, do la karaj kaj entuziasmaj organizantoj preparas programojn entute de la sepa ĝis la dudek kvina de majo por la kongresanoj. Kaj kiajn programojn? Altnivelaj fakaj prelegoj kaj ekspozicioj, amuzaj programoj, ekskursoj, koncertoj, folkloraj prezentadoj, historiaj memoraĵoj kaj naturaj belaĵoj allogas la partoprenantojn en la plej bela monato de la jaro.

Do ankoraŭfoje: la kvardektria IFEF Kongreso okazos en Olomouc inter la dekunua kaj la deksepa de majo. Pli detalajn informojn kaj aliĝilojn petu de la Fervojista Sekcio de HEA!

### A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!

1. Mit ígért a rádióbemondó a múlt alkalommal?

2. Hányadik kongresszusra kerül sor?

3. Mely ország mely városában rendezik meg a kongresszust?

4. Hol lesz az előkongresszus és hol lesz az utókongresszus?

5. Milyen programokra kerül sor a kongresszuson? Soroljon fel legalább hármat!

6. Mikor kerül sor magára a kongresszusra?

\*\*\*\*\*

## 2. Kodály gyermekkoráról

Kodály estis ĉiam eminenta lernanto, tamen li trovis tempon kaj eblon evoluigi sian muzikan talenton. Preskaŭ sen instruo li ellernis ludi fortepianon kaj violonon. Kiam li konstatis, ke por la hejma kamermuzika ludado mankas ludanto de violonĉelo, li aŭtodidakte ludis per tiu instrumento.

Sed ankaŭ en la muzika vivo de la urbo li vigle partoprenis. Li havis eblon studadi la partiturojn de la klasikuloj, kaj li ricevis la unuajn instigojn fariĝi komponisto. Sed post la fino de la gimnaziaj jaroj, estis por li granda problemo, kion studadi poste. En tiu tempo ankoraŭ ne estis eble studi muziksciencon sur universitata nivelo en Hungario.

Ankaŭ la gepatroj de Kodály deziris, ke ilia filo havu bonan profesion, konvenan al la vivteno. Pro tio Kodály decidis studi hungaran kaj germanan filologiojn, kaj samtempe viziti Budapeŝtan Muzikan Alternejon, la tiel nomatan Muzikakademion.

Li ne sentis sin kontenta, ĉar li sciis, ke la influo de la klasika kaj romantika muzikoj de la 19-a jarcento, jam ne povas konduki al komponado de vere valoraj verkoj. La solvon li trovis, kiam lia scienca interesiĝo turniĝis al la hungara kamparana kanto, al la vera, nefalsigita hungara popolkanto. Li tramigradis sian patrolandon, kolektis popolkantojn, kaj la unua rezulto de ĉi tiu laboro estis lia filologia disertacio pri la strofa konstruo de la hungara popolkanto.

### **A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!**

1. Milyen hangszereken tanult majdnem tanári segítség nélkül játszani az ifjú Kodály?
2. Miért tanult Kodály gordonkázni?
3. Mikor kapta az első ösztönzést arra, hogy zeneszerző legyen?
4. Milyen tanulmányokat folytatott Kodály a gimnázium után?
5. Mi segítette igazán értékes művek alkotásához?
6. Mi volt filológiai disszertációjának témája?

\*\*\*\*\*

### **3. Folyók szabályozása**

La kleraj hungaroj de la 19-a jarcento ekcelis grandan taskon. Ili decidis interdigigi la riveron Tisza, kiu danĝere minacis multajn areojn de la hungara ebenaĵo per siaj oftaj inundoj. La kontraŭinundaj laboroj estis tre signifaj. La fluejo de la serpentuma rivero estis mallongigita per multaj trasekcadoj. Ĝia fluo estis

plirapidigita per grandegaj mallarĝigaj digoj. La kontraŭinundaj digoj malhelpis, ke la superflua parto de la pluvakvo enfluu la fluejojn de la riveroj. La sekva akvoordiga tasko estis la kolektado de la surgundaj akvoj.

Paralele ankaŭ la marĉoj de la malaltaj landpartoj estis laŭgrade sekigitaj. Kiom kreskis la nombro de la pumpilstacioj, tiom kreskis la amplekso de la liberigitaj areoj. Sekve de la akvoordigaj laboroj, transformiĝis la aspekto de la hungara kamparo. La teritorio ĝis nun kovrita de akvo, ŝanĝiĝis en kulturitan agrojn, tie evoluis prosperanta agrikulturo.

La novaj landkarto anstataŭ marĉoj jam montris agrojn kaj arbarojn. La kontraŭinunda digaro estis poste konstruita kaj fortigita ankaŭ laŭlonge de la riverego Danubo. Tiu digaro estis kunligita kun la malnovaj digoj, kiuj servis la lokan ŝirmadon. Pro la oftaj pluvegoj la erozia laboro de la akvoj kaŭzis grandegan danĝeron por la agrikulturo. Krome la akvo ankaŭ en la vinbergardenoj faris grandajn domaĝojn.

### **A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!**

1. Milyen feladatot tűztek ki maguk elé a 19. század művelt magyarjai?
2. Hogyan rövidítették le a kanyargó folyó folyását?
3. Milyen további feladatok kerültek sorra?
4. Milyen területen fejlődött virágzó mezőgazdaság?

5. Melyik folyó mentén építették és erősítették még meg az árvízvédelmi védőgátakat?

6. Mi okozott nagy veszélyt a mezőgazdaság számára?

\*\*\*\*\*

#### 4. A magyar(os) konyháról

La kuirarto konsistas el tri grupoj: profesia kuirmetio, hejma kuirado kaj subĉiela kuirado. El tiuj tri la meza en la vico, do la dua estas tradicie virina okupo.

En la profesiaj kuirmetiejoj oni aplikas industriajn kuirmetodojn. En Hungario ĉiam pli kaj pli disvastiĝas la fabrikaj kaj uzinaj manĝejoj. En tiuj manĝejoj la gastoj ofte ricevas senkarakterajn manĝaĵojn. Kelkaj restoracioj tamen ankaŭ inter industriaj kondiĉoj produktas bonajn manĝaĵojn.

La subĉiela kuirarto estas tre simpla, ĉar ĝin praktikas ĉefe nur viroj. Oni uzas malmultajn kuirilojn kaj malmulte da diversaj materialoj. Ni ne forgesu, ke la viroj iris por labori, kaj ili nur en siaj liberaj duonhoroj preparis la manĝaĵojn. La subĉielajn manĝaĵojn karakterizas la puraj gustoj kaj aromoj. La kutima ilo estas la simpla rostro-stango. Por tiu ĉi celo tute ne taŭgas la stango el akacio, ĉar ĝi en fajro iĝas amara. Sur la stangoj oni rostas ĉefe lardon kun cepo super la liberarea fajro.

La fajrokradoj en nia lando ĝis nun ankoraŭ ne disvastiĝis. Pli favorata estas la kaldrono. En ĝi oni kutime kuiras paprikaĵon. Sed la plej ŝatata okupiĝo por fiŝkaptistoj kaj fiŝhokistoj estas la kuirado de fiŝoj.

Ĝi estas ne nur scienco, sed laŭ ili ĝi estas jam arto. En Hungario koncerne la fiŝkuiradon troveblas tiom da kutimoj kaj gustoj, kiom da riveroj kaj lagoj. Ĉie regas la akreco pro la forta papriko, kaj la eksterlandanoj tre suferas dum manĝado.

#### A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!

1. A hivatásos konyhaművészetnek mely fajtái ismertek?
2. Hagyományosan a konyhaművészet melyik ágát gyakorolják a nők?
3. Mik a fő jellemzői a szabadtéri ételkészítésnek?
4. Mit sütnék nyárson?
5. Melyik a kedvenc főzőedény?
6. Mi adja a halászlé jellegzetességeit?

\*\*\*\*\*

#### 5. Kőműves Kelemen

La baza temo de „Masonisto Kelemen” estas komuna motivo en pluraj balkanaj populaj tradicioj. La motivo venis en Hungarion el la rumana kultursfero, tial ĝi troveblas plejparte en la regiono Transilvanio, kie ankaŭ Zoltán Kodály notis ĝin dum sia kolekta vojaĝo.

El tiu ĉi temo estis verkita moderna hungara rok-opero. Laŭ la muzika dramo la masonistoj, kiuj kontraktis pri konstruo de la fortikaĵo de Deva, vane laboras jam tutan monaton: la muro ree kaj ree disfalas. La masonistoj estas konvinkitaj, ke la malsukceson



kaŭzas malbonaj spiritoj, vagantaj sur la monto. Tiujn nur per ofero eblas pacigi, do necesas enmurigi tiun edzinon, kiu la unua venos al ili. „Masonisto Kelemen” dubas: ĉu indas oferi homan vivon por senviva ŝtonamaso? La fortikaĵo tamen devas finkonstruiĝi, ĉar la masonistoj entreprenis tiun laboron.

La „rok opero” atingis grandan sukceson. Ne nur inter la hungara junularo, sed ankaŭ inter la elmigrintoj en Usono. La sukceson klarigas unue la kunlaborintaro, sed la plej grava faktoro en la sukceso estis la muziko mem, kiu kunfandas unuecan tuton el diversaj muzikspecoj, inter kiuj rolas ankaŭ ebria kantaĉo de hungaraj sinjoroj. La verko „Masonisto Kelemen” estas altranga etapo en la evoluo de la hungara rok-opero. Tiun gradon superi estos malfacila, tamen inda tasko por sekva generacio. Vere meritas laŭdon Levente Szörényi, János Bródi, Csaba Ivánka, kaj ĉiuj entuziasmaj rolintoj.

### **A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!**

1. Mely népek hagyományában található meg a „Kőműves Kelemen” alaptémája?
2. Honnan jött ez a motívum Magyarországra?
3. Mi készült e témából Magyarországon?
4. Miért omlik le újra meg újra a fal a kőművesek szerint?
5. Hol aratott sikert a mű?
6. Mi magyarázza a sikert?

\*\*\*\*\*

## **6. Szilágyi Ferenc**

Ferenc Szilágyi longe vivis en Svedlando, sed anime konstante en Hungario. Li estis multflanka esperantisto. Kiel organizanto li kreis en Budapeŝto viglan kulturan vivon. Kiel lingvopedagogo, li donis novajn trajtojn al la rekta metodo de la instruado. Kiel poeto li ne produktis multe, tamen li kreis en sia poezio plurajn poemojn pri la milita kaoso, tiel interpretis li la krizajn tempojn.

Kiel publicisto, li apartenis al niaj plej grandaj ĵurnalistoj. Lia redakta laboro estis ampleksa, liaj artikoloj ĉiam estis viglaj, interesaj.

Sed el liaj verkoj la plej valoraj estas liaj prozverkaĵoj, nome la noveloj kaj nur unu romano. La stilon de Ferenc Szilágyi karakterizas la milda ironio, la sprita facileco, kaj la trafaj esprimoj. Li partoprenis ankaŭ en la redakta laboro de du elstaraj eldonaĵoj. La unua el tiuj estis la Literatura Mondo, en kiu aperis altnivelaj artikoloj de la tiamaj famaj esperantistoj. La dua estis la Hungara Antologio, kiu en Esperanto-traduko montras al ni la spegulon de tuta hungara poezio.

Ferenc Szilágyi mortis en la fora norda lando, en Svedlando.

### **A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!**

1. Ki volt és hol élt Szilágyi Ferenc?
2. Milyen tevékenységet folytatott?
3. Mik voltak a legértékesebb munkái?

4. Mi jellenni a stilon?
  5. Melyik két kiemelkedő kiadvány szerkesztésében vett részt?
  6. Hol halt meg Szilágyi Ferenc?
- \*\*\*\*\*

### 7. Szentendre

Norde de Budapeŝto, la larĝa rivero, la Danubo fluas inter verdaj montoj. Sur la bordoj videblas antikvaj fortikaĵruinaĵoj kaj modernaj strandoj. Kiam la turkoj okupis Bizancion, grekaj intelektuloj kaj komercistoj fuĝis Norden, kaj ili fondis la urbeton Szentendre. Krome ankaŭ sudslavaj rifuĝintoj venis en du ondoj. Ĉi tiuj du kulturoj stampis siajn karaktertrajtojn al la urbo, kiu iĝis vigla komerca centro. Ĉi tie preteriris la ĉefa okcident-orienta karavanvivo. Post la ĉeso de la Romia Imperio, ankaŭ la kulturevoluo ĉesis.

La kristanigitaj hungaroj konstruis faman preĝejon. Sur ĝia muro ĝis hodiaŭ sendifekte restis la antikva sunhorloĝo.

Intertempe la urbo iĝis ŝatata centro de la pentristoj. Atestas pri tio multaj muzeoj, ekspoziciejoj.

Szentendre estas unu el la plej ĉarmaj ekskursaj kaj refreŝigaj lokoj. Sur ĝia insulo situas netuŝebla naturrezervato, kun plurjarcentaj arboj kaj kun abundega herbaro. Ĝia subĉiela muzeo, la tiel nomata „skanzeno”, konservas la plej diversajn konstruaĵojn de la hungaraj regionoj. Somere funkcias turista hotelo kun restoracio kontraŭ tre modestaj prezoj.

### A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!

1. Miket látunk a Duna két partján?
  2. Kik tették kereskedő várossá Szentendrét?
  3. Mi segítette elő a kereskedelmet?
  4. Mi maradt fenn a római korból?
  5. Mi jellemzi ma a várost?
  6. Mik a város nevezetességei?
- \*\*\*\*\*

### 8. Hunyadi János

Armeoestro János Hunyadi defendis la intereson de la servutuloj, tial larĝaj tavoloj de la popolo subtenis la armeoestron Hunyadi en la bataloj kontraŭ la turkoj, kiuj minacis nian patrujon. Kiam la filo de János Hunyadi, Matiaso fariĝis la reĝo, li tuj firmigis la liberan translokiĝon de la servutuloj.

Sed la potenca reĝo ne tute kapablis haltigi, nur bremsi li povis la kontraŭpopolan agadon de la bienuloj. Post la morto de Matiaso firmiĝis la premado de la regantaj klasoj.

En la interna kaoso la bienuloj malhelpis la translokiĝon de siaj servutuloj. La aristokratoj premis la loĝantaron de la evoluantaj urboj en servutulan sorton.

Kelkaj eminentaj nobeloj vane atentigis pri la danĝera situacio. En la departementoj la grandbienularo kundutis al la popolo pli kruele ol la turkoj. Tiu ĉi humiliga politiko ege malplaĉis al la popolo. Tiutempe la klasaj kontrastoj pliakriĝis en tuta Eŭropo. Ekplodis kamparanaj ribeloj, precipe en Germanio. La

popolo postulis radikalajn sociajn ŝanĝojn. La ribelojn subtenis la malriĉaj tavoloj de la urboj.

Hungarion minacis ĉe la sudaj limoj la invado de la turka armeo. Multaj rifuĝintoj venis en nian landon el tiuj regionoj, kiujn la turkoj okupis. La nobeluraro restis indiferenta, kvankam la turka armeo rapide proksimiĝis al nia lando.

### **A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!**

1. Miért támogatták széles néprétegek Hunyadi János harcát a török ellen?
2. Ki erősítette meg a jobbágyok szabad költözködési jogát?
3. Kik taszították jobbágysorba a fejlődő város lakosságait?
4. Hol törtek ki parasztlázadások?
5. Mi fenyegette Magyarország déli határait?
6. Honnan jött sok menekült az országunkba?

\*\*\*\*\*

### **9. Dózsa György**

Kontarŭ la turkoj Tamás Bakócz ricevis komision de la papo por organizi krucan militon. Sed ĉe la ĉefnobreloj mankis la entuziasmo. Tamás Bakócz por solena deklaro de la kruca milito celebris sanktan meson. Dum la ceremonio en la unua benkovico sidis ankaŭ György Dózsa, kiun Tamás Bakócz invitis persone.

Post la solena ceremonio la ĉefpastro transdonis al György Dózsa la ruĝkrucan flagon de la papo.

Dózsa estis limfortikaĵa soldato en Nándorfehérvár. Li tie jam kuraĝe batalis kontraŭ la turkoj, kiuj tiam jam ofte trapaŝis la hungaran landlimon. Dózsa foje en duelo venkis iun turkan oficiron, kaj pro tio la reĝo donacis al li nobelan rangon.

La nova nobela armeoestro komencis la organizadon de la „kruca armeo”. La organizantoj de la popola armeo estis grandparte pastroj kaj monaĥoj, ĉar ili sentis pli intiman parancecon kun la popolo. La kamparanoj kaj la malriĉaj loĝantoj de la urboj amase kolektiĝis por partopreni en la kruca armeo. Kiam la grandbienuloj konstatis, ke la kamparanoj ne volas reiri en siajn loĝlokojn, ili ordonis, ke la popola armeo sen armiloj ekiru kontraŭ la turkoj.

Pro la kontraŭstaro de la nobelaro Tamás Bakócz volis ĉesigi la krucan militon. Sed Dózsa ne akceptis la validecon de la dekreto pri la retiro. Kiam li kun sia armeo antingis la urbon Cegléd, tie li faris sian faman paroladon. Fakte en tiu urbo komenciĝis la hungara kamparana milito, kiu poste terure estis revenĝita.

### **A hallott szöveg alapján válaszoljon a kérdésekre magyarul!**

1. Mire és kitől kapta a megbízást Bakócz Tamás?
2. Mit adott át Bakócz Tamás Dózsa Györgynek?
3. Milyen elismerésben részesítette a király Dózsát?

4. Kik voltak a keresztes hadsereg fő szervezői?
5. Mi lett Cegléden Dózsa György?
6. Mi lett a parasztháború következménye?

\*\*\*\*\*

## 10. Császárfürdő

Pri la kuracbanejo Császár pluraj historiaj faktoj pruvas, ke oni jam antaŭ mil jaroj malkovris la kuracakvon por bani sin. Arkeologoj apud la banejo trovis restaĵojn, kiuj montris, ke tiujn fontojn ankaŭ la romianoj uzis daŭre. Dum la regado de la turkoj la akvoamaso de la banejo estis tiom abunda, ke ĝi movis du muelilojn en la fama muellageto. En tiu epoko ĝi estas lukse instalita kaj ekipita per siatempe modernaj kuracrimedoj.

La konata turka vojaĝanto Evlia Cselebi preferis la kolorplenajn priskribojn. Laŭ li, en ok lokoj elŝprucas vere surfuraj fontoj, kies akvoj nutras multajn banejojn.

Post la turka regado tiu banejo iĝis posedaĵo de la ŝtata fisko. Kiam aĉetis ĝin István Marcibányi, li disponigis la banejon por la kuracado de mizeraj, forlasitaj malsanuloj.

